

Tamen kompreni

Ĉiu lingvo vivas en sia propra medio, respondas al specifa bezono de la socio aŭ de la epoko, kaj iom post iom konstruiĝas kaj evoluas laŭ tiu bezono. Industriiĝo kaj kresko de la faka terminaro ekde la deknaŭa jarcento, pli kaj pli larĝa uzo de telefono, apero de interretaj komunikiloj kaj tekst-aranĝiloj fine de la dudeka jarcento, kaj abundo de reklamaj sloganoj lastajn jardekojn, estas ekzemploj de historiaj faktoj kiuj profunde modifis la naciajn lingvojn de la industriaj landoj.

Ankaŭ la tendenco havi hegemonian sintenon, eĉ foje je internacia skalo, okazigas rapidan evoluon ĉe tiuj lingvoj.

Tiaj modifoj apenaŭ tuŝas la pli lokajn lingvojn, kiuj plu restas ĉefe (eĉ foje ekskluzive) parolataj, distance de tiuj sociaj ŝanĝiĝoj, plu konservante valorojn kulturan kaj tradician.

Aliektreme de la lingva katalogo, kiu estas la specifa rolo rezervita al Esperanto, lingvo internacia? Ĉu ĝi havu specialajn karakterizojn, eĉ se inkluzive de aliaj, se ni konsideras:

- . ke ĝi estas kaj longtempe restos lingvo de disigita komunumo,
- . ke ĝia interreta uzo estas proporcie giganta,
- . ke la socio ĝin destinas al ĉefe skriba uzo por profesiaj bezonoj,
- . ke la nuna uzantaro sentas tute alispecan bezonon por ĝi.

Tiu prezento celas analizi iom detale unu el la karakterizoj de iu ajn lingvo, tio estas ĝia rezistiveco al diversaj difektoj, ĝia kapablo esti efektive uzebla kaj eĉ uzinda. Ĝi pli precize respondas al la demandoj pri kio komune nomiĝas eraro, kaj studas ĝis kiu nivelo de difektiteco, teksto restas komprenebla malgraŭ akumulado de eraroj.

Sed ĝuste tiu kapablo de lingvo grande varias laŭ la tipo de uzo kaj de esprimo-bezono, laŭ la kunteksto, laŭ la situacio, laŭ la nivelo de urĝeco, de emocio, de konflikto, de intereso.

Ni devas distingi inter tri "specoj" de lingvo-uzo: la parolata lingvo (ne skribe preparita), la skribita lingvo (eĉ se laŭvoĉe legata) kaj la eldirata lingvo (skribe preparita kaj deklamata). La tria kategorio rilatas al teksto originale skribita, sed voĉe komunikata (teatraĵo, filmo, deklamado ...). Tiuj tri kategorioj estos ie-tie menciitaj, laŭlonge de la sekvantaj paragrafoj, por precizigi la specifajn tipojn de eraroj renkonteblaj, kaj de redundanco kiu helpas por tamen kompreni tekston, mesaĝon, konversacion, pli ĝenerale ĉiuspecan informon.

En PIV, la dua difino de la termino "eraro" koncernas nian problemon. Tiu difino estas fakte plej breva: "nekorektaĵo en la parolado aŭ skribado".

Videble eraro estas io ofendas la ortografion (specifitan en PIV), la gramatikon (detalitan en PAG), la sencon (difinitan en PIV) aŭ la kuntekston. Io kio ĝenas la leganton aŭ la aŭskultanton, ĉar ne ĝusta, ne kohera, ne logika, ne kongrua al iu regulo, al la leksikono, al alia informo troviĝanta en aŭ ekster la teksto mem.

Kvankam la limoj inter la kategorioj de eraroj estas ne ĉiam klaraj, ni tamen povas provizore menciigi la precipajn: la leksikan (ĉu tajperaro ĉu fuŝita ortografio), la sintaksan (rilate al la regularo de la gramatiko), la semantikan (rilate al iu difino de la vortaro, al senco de iu radiko). Al tiuj aldoniĝas, kaze de kursiva skribado, la nelegeblo (malrespekto de la principo skribi legeble laŭ la "oficialaj" kursivaj karakteroj), kaj kaze de parolado, la eraroj pri prononcado kaj akcentado.

Eĉ se ilin ni ne detalos pli, fine de la listo troviĝas: ĉiuj problemoj rilate la stilon, ambigueco, fantazia uzo de la interpunkciado (aŭ de adekvata tono kadre de legado), de la majuskloj, fuŝado de la tekst-aranĝo kaj de la prezento.

Ni forgesos pri la videblo de la inko kaj pri la aŭdeblo de sonorizado, sed ne estus troige ilin aldoni ĉar ili efektive ĝenas la komprenon. Ni tamen devojiĝus de lingvaj eraroj al vere teknikaj problemoj kiuj nocas pli al la klareco ol al la ĝusteco, kvankam ĉia difektiĝo de la mesaĝo kunagas en limigo de la komunikado, kaj fine necesigas kroman informon por kompensi la ĝenon.

Lingvo estas ilo por helpi en interkompreno de ĝiaj uzantoj. Lingvo estas tre evoluinta ilo kiun oni respektu, same kiel ĉiu laboristo devas respekti siajn ilojn. Sed lingvo estas ilo kies fuŝizado efektive modifas ĝian utilecon, precipe pro la fakto ke ĝi limigas ĝian efikecon (certeco pri la senco, rapideco de kompreno, trafeco de argumento, flueco kaj natureco de dialogo, ktp ...). Plejofte parton de teksto, eĉ grandan parton kadre de la parolata lingvo, oni ne komprenas aŭ pli ĝuste oni ignoras. Sed paradokse, la esenco estas komprenata, ofte eĉ iom pli ol la esenco. Krome, ne ĉio komprenata plu restas en la memoro, kvazaŭ filtro-procezo intervenus por elimini la ornamaĵojn. Eraro do, principe ne gravas ĉar la kompleksa ilo, enhavas en si mem rimedon por kontroli, limigi kaj eĉ, ĝis ia nivelo, neniigi konsekvencon de eraro. Tiu marĝena ebleco de memkorektado nomiĝas redundanco. Ni ne forgesu ke laŭteorie lingvo sen redundanco tute ne uzeblas.

Kiel intervenas la redundanco? Estas notinde ke uzado (konsumado) de redundanco, rapide limigas la eblecon oftigi erarojn aŭ mankojn. Por kompreni malgraŭ manko aŭ misaŭdo, estas necese trovi la informon aliloke, en aŭ ekster la teksto, do konsumi iom da rezerva redundanco. Por korekti post konstato de kontraŭdiro inter du elementoj, tria elemento nepre devas interveni. Do por ĉiu erara elemento, estas statistike necese konsumi du redundancajn elementojn (unu por konstati, unu por decidi). La simpla frazo *Liaj ĉapelo estas larĝaj* restas komprenebla ĉar la plurala marko aperas dufoje (duoble pli ol la singulara), sed la frazo *Liaj ĉapelo estas larĝaj kaj griza* restas enigma pri la nombro de ĉapeloj ĉar la rezervo de redundanco estas entute konsumita.

Aliflanke, la redundanca informo (krom eble la kunteksta) ne estas prezentata kiel aparta speco de informo, apartigebla kaj distingebla ene de iu teksto, nek ene de diraĵo. Do tiu informo evidente entenas la saman proporcion da eraroj, kiel la cetero de la teksto. Nek pli, nek malpli. Do trans iu specifa kvanto, redundanco neutilas kaj eĉ foje malutilas.

Ni donu simplajn ekzemplojn por ilustru la diversajn tipojn de entekstaj redundancoj:
leksika: tiu tipo ĝenerale aperas pro malsama probableco de literoj, kaj interalie pro aldonitaj literoj ne necesaj por diveni la ceteron de iu radiko (elefanto). La triopo "ant" estas tutcerta (plej probabla), do laŭ la teorio, alportas neniom da nova informo, nur leksikan redundancon.

sintaksa: la kvin tabloj, ... rilate la temon, ...

semantika: helike malrapida, ... beleco, ... somera suno-varmo, ... morgaŭ li

laboros ...

Je ĉiu nivelo, eblas eldiri ĝeneralan principon : ju pli probabla ("ju pli ofta" estus tro simplige), en preciza loko de teksto, estas apero de iu specifa litero, de gramatika marko, de senco-elemento, de radiko aŭ de vorto, des malpli da nova informo tiu ĉi alportas, sed des pli redundance ĝi efikas. Karakteriza ekzemplo : la konsonanto "ŭ" alportas multe da informo komence de vorto, ĉar tie ne tre ekspektata, kaj neniom da fine de vorto, ĉar tie sufiĉe banala.

La kunteksta redundanco (nekontesteble la plej grava) estas iom alispeca. Principe, ĝi rilatas al neniun tipo de eraro. Pli ĝenerale, ĝi estas preskaŭ tute sendependa de la lingvo mem. Kunteksto ne entenas eraron, restas nediskutebla (krom eble nia propra memoro kiam ĝi kolapsas).

La limo inter la teksto kaj la kunteksto ne estas tre preciza. Ĉi-poste, la informo-sistemo analizita, estas arbitre limigita al frazo. Ties antaŭaj frazoj, ĉar jam diritaj aŭ legitaj, apartenas do al ĝia kunteksto (vidu poste pri la t.n. *antaŭa kunteksto*).

La kunteksta (ekstera al la teksto-peco) redundanco ŝajne apartiĝas laŭ ses kategorioj :

1. la spaco-tempa kunteksto rilatas al la loko, la lando, la momento de la tago, la epoko, la sezono. Foje, ĝuste tiu ĉi mankas ĉe la komenco de verko (kaze de skribita aŭ eldirata lingvo), kaj malhelpas nin facile "eniri" la tekston. Male en la parolata lingvo, ĝi estas implica.

2. la ĉirkaŭa kunteksto rilatas al bildoj aŭ ilustraĵoj, sono, odoro, gusto, tuŝo, cirkonstanco, etoso, vetero. Ankaŭ tiu speco mankas komence de skribita verko. Ĝi poste aperas sed restas relative limigita kadre de tiu lingvouzo. Kaze de eldirata lingvo (teatraĵoj, filmo, ktp ...), almenaŭ la vido helpas la aŭdon.

Tiu speco de redundanco intervenas ekzemple por scii ĉu "kafo", "teo" aŭ "sojo" rilatas al la planta elemento (grajno, folio aŭ ŝoso), aŭ al likvaĵo (infuzita trinkaĵo aŭ saŭco). Pli ĝenerale, ĝi ebligas decidi pri la signifo de plurdifina radiko en PIV.

3. la antaŭa kunteksto rilatas al la aliaj (antaŭaj) frazoj de la teksto aŭ konversacio. Denove tiu speco mankas ĉe la komenco sed sendepende de lingvo-uzo. Ĝi poste regule ampleksiĝas.

4. la kultura sperto rilatas al nia propra aŭ kolektiva memoro, scio pri aktualaĵo, pri la socio, pri la vivmaniero kaj moro, pri la Historio, pri la logiko, pri la fako pridiskutata, pri la lingvo (metaforoj, oksimoroj, proverboj, vortludoj, maloftaj kunmetaĵoj kaj apudmetaĵoj, ... el konataj verkoj), pli ĝenerale pri niaj komunaj referencoj. Ĝi ne dependas de la tipo de lingvo-uzo, sed ju pli kulture disigita estas la lingva komunumo, des malpli efikas tia speco de kunteksto en la komunikado, eĉ rilate la lingvon mem.

Interalie tiu kategorio de redundanco esencas por kompreni la proprajn nomojn, ankaŭ por esti kapabla ilin literumi kaj memori.

5. la antaŭ-scio pri la skribanto aŭ parolanto mem, ties mieno kaj gestoj, temperamento, influoj kaj referencoj, konataj stilo kaj opinioj, antaŭaj diraĵoj, ties lerteco en la uzata lingvo, ties kutimaj eraroj kaj akĉento. Tiutipa redundanco ege varias. Ĝi estas iom pli limigita kaze de skribita kaj eldirata lingvouzoj. Ĝi cetere klarigas kial unuafoja renkonto de iu homo okazigas miskomprenojn kiuj ofte solviĝas poste.

Tiuj du lastaj tipoj de kunteksta redundanco subtile kunefikas en la kompreno de ironio, de aludo kaj de subdiro.

6. la sesa kategorio respondas al specifaj kazoj (presitaj dokumentoj aŭ libroj), kiam la esencon de la signifo ne provizas la teksto mem, sed alia specifa kodo kun propraj leksiko, sintakso kaj semantiko. Eblas citi kelkajn ekzemplojn : t.n. ekzaktaj sciencoj

(matematikaj ekvacioj, ĥemiaj formuloj, elektronikaj skemoj, komputikaj lingvoj de programoj), ankaŭ reklamo kaj foje bildstrioj.

Rilate tiun sesan kategorion pri tiaj help-lingvaĵoj, estus interese analizi, same kiel ni faras ĉi-takste pri natura lingvo, ĉefe en la kvar cititaj teknikaj kazoj (ekvacioj, formuloj, skemoj, programoj), ĉiujn aspektojn de la informo kaj redundanco. Sed evidente tio kondukus nin al tre longa stud-vojaĝo. Sed ni certe povus konstati ke ili situas en kvar specifaj situacioj, kongrue kun specifaj bezonoj, interalie de koncizeco, pri kiuj la kapabloj de natura lingvo, pro siaj propraj karakterizoj, apenaŭ sufiĉas: multege tro da redundanco (pli ĝenerale teknika teksto estu malplej redundanca por plu garantii koherencecon de sinsekvaj dokumento-versioj), alfabeto ne adekvata (la diversaj signoj uzataj en matematiko pli proksimas al ideogramoj: $+ = \exists \forall \in \Rightarrow \leq \infty \pm$ ktp ...), leksikono tro vasta, sintakso tro komplika, semantiko ne preciza, cetere ne sufiĉe universala kaj specara. Krome, la kunteksto tute koncentriĝas en la tria (sinsekvo de ekvacioj) kaj kvara (tradiciaj nomoj de variabloj, entjeraj indicoj, funkcioj, koordinatoj, ...) kategorioj.

Kaze de sugestivaj-esprimivaj bildoj (reklamoj), la problemo ŝajne estus tute inversita, sed same estus konstatebla la maladekvateco de natura lingvo.

Per parolata lingvo, multaj diraĵoj estas nur komentoj superflujaj, interjekcioj instinktaj, aposterioraj reagoj pri io ĵus okazinta antaŭ pluraj ĉeestantoj (akcidento, komuna entuziasmo de homamaso, spekte de matĉo ...). Ili esprimas propran senton, sed apenaŭ aldonas informon. Tiukaze la kunteksto mem informas.

Eĉ ekster tiu ekstrema kazo, preskaŭ ĉiam helpas la kunteksto. Nu, fakte ja ĉiam intervenas kunteksto. Ofte, izolita frazo ne sufiĉas por kompreni (eventuale ĝi ne estas tradukebla), ĉar ĝuste mankas la kunteksto. Feliĉe, la izolitaj frazoj apenaŭ renkonteblas en la ĉiutaga vivo. Ili bedaŭrinde svarmas en lingvo-kursoj, interalie en kursoj pri Esperanto (traduk-ekzercoj aŭ gramatikaj lecionoj), kaj supozeble tio limigas la efikecon de la instruado mem. Ĉu lingvo estas lernebla (ĉu ĝi estus eĉ uzinda?) sen mensa integriĝo de ĉiukaza kunteksto?

La kunteksto ekskluzive helpas en la korektado de eraroj kiuj rilatas al tiu speciala parto de la gramatiko nomata sinetio. Ĝiaj reguloj koncernas formon aŭ vorton en akordo kun la ideo mem, sendepende de la apudaj vortoj (tradicie: elekto inter *is*, *as* kaj *os*, inter *tiu* kaj *tia*, inter *li*, *ŝi* kaj *ĝi*, ...). Oni devas rekoni ke en Esperanto, tiuj kazoj estas rimarkinde oftaj, interalie pro manko de konjugacio. Tio povas koncerni ankaŭ la elekton inter *ju pli* kaj *des pli*, inter *kvankam* kaj *tamen*, eĉ la uzon de la pluralo, ... Almenaŭ la kvar unuaj specoj de kunteksta redundanco (spaco-tempa, ĉirkaŭa, antaŭaj frazoj, kulturaj scioj, ktp ...) povas interveni en tiaj kazoj, por gvidi al ĝusta kompreno. Tamen tiaj eraroj povas esti relative ĝenaj, precipe komence de skribita aŭ eldirata teksto.

Uzeblas en Esperanto tiuj elipsaj formoj, pri kiuj minimuma kono de la kunteksto daŭre necesas, almenaŭ tiom longe ke iliaj sencoj ne estos definitive fiksataj. Foje tiel estas pri la uzo de la ne sufiĉe uzataj, ĉar ne sufiĉe instruataj (kaj reciproke), sufikso *um*, prefiksoj *per* kaj *for*, ktp ... Ke *fingrumi* signifas "palpi per fingroj" (PIV), "nombri per fingroj", aŭ "drumeti per fingroj", aŭ ion alian, decidis unue la ĉirkaŭa kunteksto, poste la ĝenerala uzo (kultura kunteksto), fine la oficialigo far la vortaro.

Fine de tiu parentezo pri la esenca rolo de la kunteksto, ni notu ke la leksikono uzata mem dependas de la kunteksto. Eĉ ekster la perimetro de la fakaj vortoj, la probableco uzi iun ajn vorton aŭ radikon multe varias de kunteksto al alia. Tiu intera disleksikiĝo de du tekstoj *n* kaj *m*, estas matematike facile modelizebla per determino de la angulo Φ

formita de ambaŭ N-dimensiaj probablo-vektoroj (P_n kaj P_m), kun $N =$ nombro de literoj, karaktroj, vortoj (aŭ eĉ pli bone por lingvo tia kia Esperanto $N =$ nombro de radikoj). Kiam la angulo Φ estas nula aŭ tre akuta, la leksikono estas statistike same uzata. Aliekestreme, angulo orta indikas ke neniu elemento de la leksikono estas uzata en ambaŭ tekstoj. Tiu metodo same uzeblas por mezuri malsimilecon de leksikono inter uzotipoj skribita, parolata, eldirata (kaj eĉ nivelon de parenceco aŭ de influo inter lingvoj, sed temas pri tute alispeca problemo).

Ŝajne en Esperanto, male al naciaj lingvoj (almenaŭ hind-eŭropaj), la angulo Φ pli malakutiĝas pro la ŝanĝo de kunteksto, ol pro ŝanĝo de uzo-tipo. Sed konfirmo de tiu aserto necesigus mezuri je ĉiu kazo, la probablecojn de ĉiuj radikoj, do je ĉiu kazo plenumi la laboron de Zlatko Tišljariĉ en sia "Frekvencmorfemaro de parolata esperanto" !! Tamen tre simpla programo de hejma komputoro povus tion rapide konfirmi, kaj eble reveli aliajn interesajn konstatojn.

Noto por matematikemuloj :

$$\cos\Phi = \frac{P_n \cdot P_m}{\|P_n\| \|P_m\|} = \frac{\sum_i (p_{n_i} \cdot p_{m_i})}{\sqrt{\sum_i p_{n_i}^2 \sum_i p_{m_i}^2}} \quad \text{kun } 0 \leq \Phi \leq \frac{\pi}{2} \text{ ekde tute identa uzo de la leksikono,}$$

ĝis uzo de du leksikonoj sen komunaj partoj inter la tekstoj n kaj m .

Por ilustrati la kontraŭajn efikojn de la eraroj kaj de la redundanco, ni nun uzu la ĉi-postan ekzemplon. Al ĝia unua (normala) versio, diversspecaj eraroj regule aldoniĝas. La ĝeno kreskas ĝis absoluta nekompreneo kaze de akumulado de ĉiuj eraro-tipoj. Jen do la ekzemplo :

Baza frazo :

Hieraŭ, la ĉarma knabino sidis antaŭ sia skribotablo la tutan matenon.

Komento : Nu ! Kial ne ?

Leksikaj eraroj :

Ieraŭ, la ĉerma knatino sidis antaŭ saa skritotablo la tutan marenon.

Komento : Tiuj kelkaj eraroj (ĉu pro fuŝa tajpo ĉu pro miskono de la ortografio) certe ĝenas la leganton, sed ne malhelpas trovi la sencon, esence ĉar tiaj radikoj ne ekzistas, krom la paro "mar-eno", sed neniu dubo restas post legado de la frazo. Eble la cerbo de la leganto stumblos ĉe "knatino", kiu same similas al "katino" kiel al "knabino" aŭ "konatino", sed helpas la kunteksto. Nun ni faru du rimarkojn :

. povas korekti nur tiu kiu minimume konas la vortaron, almenaŭ por ke vorto ne konata estu instinkte forĵetita. Alidirite, profunda kono de la vortaro utilas ne nur por kompreni, sed ankaŭ por mense kribli kaj forĵeti ĉion kio ne ekzistas,

. helpas la redundanco de iu kategorio (ĉi tie kunteksta) en la korektado de eraro el alia kategorio (ĉi tie leksika).

Efektive konfuzoj eblas rilate al la similaj formoj de kelkaj radikoj / radikeroj. Ni citu nur kelkajn : "ent" (prezidento, insurgento, serĝento) kaj "ant" (adjutanto, komandanto, prezidanto), "nun" (denunci, inundi) kaj "non" (anonci, prononci), "ament" (apartamento, parlamento, fundamento) kaj "ement" (departemento, komplemento). Fine, en kelkaj vortoj, grupeto da literoj estas inversitaj kompare kun aliaj lingvoj (pampelmuso, dromedaro).

Aliaj tajperaroj konsistas en inverso de sinsekvaj literoj (tio povas iom ĝeni en uzo de kelkaj vortetoj : ne/en al/la eĉ/ĉe). Foje okazas ankaŭ malapero de vorto (nova fenomeno pro supertajpado post permusa selektado).

Sintaksaj eraroj :

Hieraŭ, la ĉarma knabinoj sidos antaŭe ŝia skribotabli la tuta matenon.

Komento : La troan pluralon (knabinoj) korektas la singulara "ŝia", la kunteksto (ceteraj frazoj de la teksto) kaj la logiko. La "tuta" sen akuzativo estas eĉ sufiĉe ofta eraro, kaj nur incitetas la leganton. La aldono de "e" post la prepozicio "antaŭ" estas iom pli ĝena, ĉar unualege eblas kompreni "antaŭe ŝia / sia" (antaŭe sed ne plu). Sed nepre mankas prepozicio por enkonduki la indikon de loko, do miskompreno rapide malaperas. Pri "ŝia" anstataŭ la refleksiva formo, helpas la kunteksto (la refleksivon multaj ne nature uzas). La i-finaĵo eble estas simple tajperaro. Restas la pli tikla problemo "sidos" anstataŭ "sidis". Ĉu la eraro ne situus ĉe la vorto "hieraŭ" (anstataŭ "morgaŭ" pro manko de atento)? Ni konsultu la ceteron de la teksto por decidi. Konklude : denove per minimuma kono de la gramatiko kaj de la plej tradiciaj eraroj, la frazo restas komprenebla.

Semantikaj eraroj :

Hieraŭ, ja varma knabino fidis ankaŭ sia skribokablo la mutan matenon.

Komento : Semantikaj eraroj ofte venas de fuŝa traduko, aŭ de kolizio kun nia denaska lingvo. Ni menciuj la falsajn amikojn, la "duone" falsajn amikojn (kiam simila vorto ne konservas ĉiujn sencojn de la alia lingvo), tradiciajn esprimojn laŭvorte tradukitajn, kaj tiajn plu. Ekzemple tiuj konfuzoj renkonteblaj iom sendepende de la denaska lingvo de la eraranto : "pensi / opini", "ŝanco / fortuna", "revi / sonĝi", "figuro / silueto", "ebena / plata", "ignori / ne scii", kaj sufiĉe multaj aliaj. Foje simileco de kelkaj radikoj facile enkondukas tiajn erarojn ("damaĝi / damaĝi", "rezigni / rezignacii", "responsi / respondi", "kompromiti / kompromisi", "avokado / advokato", "palaco / palato", "preskribi / priskribi", "muso / muŝo", "nevo / nepo", ... sen forgesi la radikojn-seriojn kiel "jur / ĵur / ĵuri / just / ĝust / justic / juĝ / jug ... kiuj ofte aperas kune en procesaj procezo kaj proceduro).

En la ekzemplo mem, la eraroj videble venas de tro rapida tajpado kiu hazarde rezultigas ekzistantajn radikojn, sed evidente ne ĉiuj pro konfuzo en la elekto de la radikoj. Ni tamen konservas ilin por ilustrado, supozante ke kaŭzas ilin miskono de la sencoj. Povus tiel esti, ĉu ne ?

Ŝajnas ke plejofte helpas la kunteksto en la korektado kaj en la kompreno, foje la gramatiko ("ankaŭ" anstataŭ "antaŭ").

Akumulado de ĉiuspecaj eraroj :

Ieraŭ, ja verma knatino fidis ankaŭe ŝaa skribokabli la muta marenon.

Komento : Se iu rekte legus tian frazaĉon, tiu certe nenion komprenus. Ties fonto de redundanco ne plu estas sufiĉa por mem-korektado. La kapablo de la lingvo rezisti al sinsekvo de eraroj estas atingita.

Kiel ni ĵus konstatis, la limoj de la eraro-kategorioj estas sufiĉe malprecizaj. Por ankoraŭ nete tion ilustru, ni citu la du jenajn ekzemplojn.

Foje kelkaj prepozicioj estas mise uzataj. La plej oftaj kazoj rilatas al interŝanĝo en la paroj : "kun / per", "por / pro", "tra / trans". Plej ofte tia eraro ne ĝenas por firma

komprezo. Tamen dubo povas persisti en kelkaj frazoj. Ĉar en tiuj kazoj kulpas misuzo de prepozicio, oni iom rapide katalogas ilin, se ne sintaksaj, almenaŭ gramatikaj. Sed prepozicioj estas radikaj vortoj. Kiel ĉiuj radikoj, ili estas ligitaj al specifaj difinoj, do al apartaj sencoj. La eraro tiel rilatas al problemo strikte semantika.

Tute same la transitiveco de la verboj (interalie fuŝa uzo de "ig-" aŭ "iĝ-") estas elemento de la senco mem de la baza radikoj. Do eraro pri transitiveco de verbo estas semantika, ne sintaksa kaj apenaŭ gramatika.

Tra tiuj kelkaj ekzemploj, ni konstatas ke estas ne ĉiam facile decidi kiukategoria estas iu eraro. Nu ne gravas la kategorio, ĉu "por" anstataŭ "pro" venas de tajp-eraro, de miskono de gramatiko, de konfuzo pri la difinoj? Eraro estas, kaj ĝenas la komprenon, sendepende de la kategorio. La tipoj de eraroj ne estas sisteme apartigeblaj.

Estas tamen notinde ke la kategorioj de redundanco (la informoj kiuj ebligas korektadon) estas, tute male, sufiĉe facile distingeblaj. Ili pli rilatas al decido de io oficiala (fundamento, gramatiko, vortaro), logika kaj eĉ fakta (kunteksto).

La uzo de redundanco por *tamen kompreni* malgraŭ ĉeesto de eraroj, intervenas ne nur por komuna komprenado, sed ankaŭ por korektado de tasko kadre de kurso, aŭ por reviziado de verko.

Kadre de reviziado, korektanto bezonas distingi, se ne la tipojn de eraroj, almenaŭ la diversajn "tavolojn" kiuj ekzistas. Povas okazi ke frazo verkita de komencanto aŭ progresanto necesigas korektojn de pluraj tipoj. Teorie, tiuj eraroj aldoniĝas sed ne kolizias. Do la korektado fareblas unuapaŝe, ekzemple rekte reskribante la tutan frazon ĝusta. Sed praktike, tian sintenon havas du malavantaĝojn.

Unue ĝi trudas arbitran decidon, kiam elekteleco bonvenus inter solvoj rilate al iu unua eraro, kvankam dua eraro de alia tipo nediskuteble ĉeestas, kaj cetere ne estas same korektebla laŭ la unuaerara alternativo.

Due pedagogie, ĝi ne ebligas klaran distingon inter pluraj intervenoj, do efikan klarigon de ĉiuj eraroj, precize kiam korektado de eraro implice neniigas aŭ maskas alian (ekz. manko de akuzativo, kiu ne plu estas menciinda pro elekto de alia aranĝo de alia frazoparto).

Bona komprenado de eraro, ebligas al la verkinto korekti mem ĉe aliaj paĝoj de la dokumento, des pli ke siaflanke korektanto ne vidas ĉion unufoje. Memkorektado estas lerno-metodo efika kaj pedagogia.

Teknike, por reviziado de teksto (krom kaze de simpla relegado por fina kontrolo), sendepende de ties celo, amplekso kaj tipo, estas konsilindaj pluraj ir-reiroj inter la verkinto kaj la revizianto, por sinsekve interveni pri la diversaj "tavoloj", nome la leksiko, la sintakso, la semantiko, la stilo.

Ĉiukaze la korektanto disponu sufiĉe da "propra" redundanco. Lia kono de la lingvo estas do speco de redundanco. La procezo por korekti tekston kadre de kurso aŭ por reviziado, ja estas la sama kiel tiu de aŭskultanto aŭ leganto, kiu klopodas kompreni malgraŭ eraroj aŭ ekstera ĝeno.

Antaŭ-konklude de tiu esploro, ni resume priskribu la specifajn karakterizojn de la diversaj uzotipoj rilate al la problemoj de ricevo de informo, de mensa korektado per redundanco, de efektiva kompreno.

Ĉe la skribita lingvo (mensa aŭ laŭvoĉa legado), granda parto de la kunteksta redundanco mankas ĉe la komenco, kaj plu restas relative limigita kaj artefarita. La tekstoj averaĝe entenas kelkajn erarojn sed ne abunde. La teksto estas maksimume legebla (krom foje se ĝi estas mane skribita), suferas neniun interrompon kaj profitas de nelimigita legodaŭro, de ebleco plurfoje relegi. Konklude la teksto povas esti tre

ellaborita, aŭdaca, komplika, leksikono pli vasta, la frazoj pli longaj kaj plurpropoziciaj.

Ĉe la eldirata lingvo (teatro, kinarto, deklamado), la spaco-tempa parto de la kunteksta redundanco mankas ĉe la komenco, sed rapide riveligās. La tekstoj tre malofte entenas erarojn, ĉar sufiĉe longe prilaboritaj. La deklamanto aŭ aktoro devas paroli plej klare (des pli kaze de bruiga publiko), nature sed sen ekscesa rapideco, kaj cetere jam konas (lernis parkere) tion direndan. La eldirado suferas neniun interrompon, kaj la deklamodaŭro estas limigita kvankam senurĝa. Neniu ripeto eblas. Konklude la teksto ne povas esti tre ellaborita, aŭdaca, komplika, sed relative pli ol en parolata lingvo, la leksikono estas iom pli vasta, la frazoj apenaŭ pli longaj. La profesieco de la aktoro estas grava atuto.

Ĉe la parolata lingvo (konversacio, debato, ordonoj, intervjuo, ...), la komunikado implice profitas de maksimuma kunteksta redundanco. La lingvo estas proksimuma, entenas relative multe da eraroj (sintaksaj, eĉ semantikaj), la akcentado estas foje misa. Aliflanke la lingva redundanco estas malpli ampleksa (interalie malpli da adverboj por emfazi, precizigi, konfirmi). La parolo ne estas ĉiam tre klara. La parolado suferas senĉesan kaj neantaŭvideblan interrompon, la parolodaŭro estas limigita, la medio brua (la ekstero alportas informon sed ankaŭ ĝenon), la streĉo sufiĉe granda. Ripeto eblas sed nur se absolute necese. Konklude la teksto ne povas esti ellaborita, aŭdaca, komplika, la leksikono estas malvasta, la frazoj kutime mallongaj kaj unupropoziciaj.

La tri specoj de lingvouzo estas do sufiĉe malsimilaj. La eldirata lingvo estas renkontebla kadre de artaj cirkonstancoj kaj iel troviĝas inter la karakterizoj de la du aliaj, eble iom pli proksime al la skribita lingvo. Male, skribita kaj parolata lingvoj estas komplementaj en la ĉiutaga vivo, la unua rilatas al multaj profesiaj fakoj, al administradaj formularoj, al la literaturo ..., la dua al la rutinaj konversacioj, spontaneaj reagoj, sed ankaŭ al la debato kaj la negoco, antaŭ aktiteco definitiva sub formo skribita.

Estas necese substreki la esprimivecon de la eldirata kaj parolata lingvoj, kiuj havas la netakseblan kapablon esprimi tion ne diritan, per simpla voĉtono, mieno, grimaceto, kaj eĉ, kvankam kun grandaj diferencoj de lando al alia, per gestoj.

Inter tiuj ĝeneralaj konsideroj pri la lingvo-uzo, ni povas observi ke Esperanto estas malmulte redunda, esence pro ĝia simplega sintakso, kaj malgraŭ la malaj efikoj, pro la aglutina karaktero, de ĝia leksiko (radikoj ne tre multnombraj / vortoj relative longaj / averaĝe pli da silaboj / ĉiuj literoj prononcataj), kaj de ĝia semantiko (plursenceco de la radikoj — *polisemio* — sufiĉe limigita). Sed ĝi restas lingvo sufiĉe natura, klara (simpla kaj fonetika) kaj esprimiva (multaj vortoj estas fonetike elvokivaj, interalie tiu sufiĉe longa listo de bruo-verboj).

Fine de tiu prezento, ni tamen devas konstati ke ne eblas taksu plan-lingvon globale ekster ĝia natura medio, sen precize scii kio estas tiu "natura medio" nek al kiu specifa bezono ĝi respondas, ĉu al majoritate skriba aŭ al parola uzo, sen demandi ĉu la lingvo iam estos esence ĉiutaga, familia, profesia, administrada, vojaĝa. Pri Esperanto, la bezono estas evidente ĉiuspeca, sed ĉu samproporcie kiel pri naciaj lingvoj. Certe ne, des pli se ni konsideras ĝiajn ŝancojn esti iam agnoskita, se ni enkalkulas la postulojn de nia moderna socio kaj ĉefe de ties decidistoj, kaj kiujn uzon kaj estontecon tiuj ĉi bonvole planus por tia lingvo (interalie ĉu lingvo-ponta ĉu hegemonia rolo).

Internacia lingvo havas la specialan taskon kontentigi plej diversajn homojn kiuj denaske parolas plej diversajn lingvojn. Ĝi devas roli kiel speco de gravito-centra lingvo.

Ĝia lingva komunumo cetere suferas limigon de komunaj kulturaj referencoj, do grandparte ne plene profitas de la helpo de la *kultura* speco de kunteksta redundanco.

Ĉu Esperanto restu do privata lingvo de nombre limigita movado? Ĉu ĝi fariĝu ponto-lingvo vere ĉiesa kaj neniesa, alproprigita ankaŭ por bezonoj profesiaj, fakaj, universitataj, artaj? Kiu estos ĝia esenca uzo-medio? Kiuspeca tipo de kunteksto plej ofte intervenos por helpi al kontentigaj komprenado kaj komunikado? Ĉu la komunaj referencoj, sociaj, kulturaj, politikaj, filozofaj aŭ historiaj, estas sufiĉe vastaj inter ni esperantistoj por ĉiumomente helpi nian interkomprenon, same kiel inter parolantoj de naciaj aŭ lokaj lingvoj? Respondo estas implica en la demando.

Nenio malpli certas, ke bezono de internacia lingvo entute identas kun bezono de nacia aŭ loka lingvo. Sed ŝajnas ke atenditaj kvalitoj de internacia lingvo ja dependas de pli detala analizo pri la perimetro de ĝia precipa uzo-kunteksto.

Rivière Christian

Belartaj Konkursoj UK Firenze 2006 (2a premio en la branĉo eseoj)